


XXIII ARTAJ KONFRONTOJ EN ESPERANTO ARKONES

POLLANDO POZNAŃ 21-23 09 2007

www.arkones.org

Ni invitas ĉiujn ŝatantojn de arto kaj kulturo al la XXIII-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES, kiuj sub la aŭspicioj de Pola Esperanto-Junularo okazos en Poznań (Pollando). La programo estos tre riĉa kaj ni garantias plenan kontentigon. Kiel kutime oni povos partopreni vesperajn koncertojn de la plej bonaj kaj bravaj artistoj (ia. JoMo kaj Liberecanoj), rigardi subtekstigitajn filmojn, partopreni multajn interesajn prelegojn kaj ĝui la plej Esperantistan koridoran etoson.



Arkonesejo, la arta lernejo kun ĉarmegaj salonoj, troviĝas proksime al la plej granda parko en Poznań kaj proksime al la urbocentro do oni povos malkovri lokajn atrakciaĵojn.

Paralele al Arkones okazos studsesio de Interlingvistikaj Studoj ĉe Adam Mickiewicz - Universitato. Tial oni havos la plezuron renkontiĝi kun geprelagantoj kaj kun gestudentoj.

Vi povas aliĝi perrete aŭ sendante la printitan aliĝilon. Rimarku, ke aliĝante (ĉe niaj ambasadoroj) dum la novjaraj aranĝoj vi konkeras taŭgan rabaton.

Aliĝperiodo	A kategorio	B kategorio	C Pollandanoj
1 (ĝis 05.01.2007)	10 €	20 €	34 zł
2 (ĝis 25.07.2007)	13 €	26 €	43 zł
3 (poste kaj surloke)	15 €	30 €	52 zł

Kategorio A: afrikaj landoj (escepte de Sudafriko), Albanio, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, eks-Jugoslavio, latinamerikaj kaj aziaj landoj (escepte de Israelo, Japanio, kaj Sudkorea Respubliko), Rumanio, Slovakio, eks-Sovetunio.

Kategorio B: ĉiuj ceteraj landoj (ankaŭ Sudafriko, Israelo, Japanio kaj Sudkorea Respubliko).

La organizantoj povas rezervi lokon en la proksima hoteleto. Jen eblecoj:

- Unu lito por unu diurno (ĉambroj kun propra necesejo kaj duŝo) en dupersona ĉambro kostas 20,00 €, en tripersono ĉambro kostas 18,00 €. Por rezervi la lokon en hoteleto sciigu la organizantojn antaŭ la 1-a de septembro 2007. Alikaze la lokoj povas esti nedisponeblaj. Decidas la vicordo de mendoj. Aliaj proksimaj hoteloj estas signife pli multekostaj.
- Koncerne malmultekostan (3.50 € por diurno) loĝeblecon por junularo (en amasloĝejo kun propraj matraco kaj dormosako) kontaktiĝu kun la organizantoj. Verŝajne eblos ankaŭ nokti en proksima studentdomo: unu lito por unu diurno en tripersono ĉambro(duŝo kaj necesejo ekstere) kostas 9,00 €

Demandojn, informojn kaj aliĝilojn sendu al: arkones@esenco.org

Paweł JANOWCZYK

ul. Zawady 2 / 7

PL 61-002 POZNAŃ

tel. +48 (61) 875-58-79

tel. +48 (602) 283-242

janowczyk.pawel@poczta.onet.pl


Prezidanto de Organiza Komitato:

Tobiasz KAŹMIERSKI

tel. +48 509-400-317

tobiasz@esenco.org

Ne forgesu viziti nian paĝon kaj nepre rigardu galerion ĉe www.arkones.org



• NIGRA || BRUNA o BLUA + VERDA | ROZA - BLANKA

www.arkones.org